



Informoj:
Arto -:- Literaturo
Turismo -:- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINIO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

GRAMATIKAJ KLARIGOJ

PRI LA ESPERANTAJ PREPOZICIOJ

Pri tiu grava temo, ni petis al S-ro Ingla-
da artikolon; tiu estimata samideano kaj kunver-
kanto, sendis al ni la subkopiitan.

I

S-ro Jozefo López Ros, el Jaen, montras en intereso artikoleto publikigita en NIA Vivo kelkajn rimarkojn pri la uzado de prepozicioj, plendante, ke ĉe kelkaj esperantaj lernolibroj oni malbone klasigas kelkajn vortetojn, nome prepoziciojn, adverbojn kaj konjunkciojn. Ĉar la demando estas ĝenerale interesa kaj klariginda, mi aldonas kelkajn rimarkojn, kiuj nur celas instrui la novicajn Esperantistojn pri la korekta uzado de tiaj vortetoj. Kompreneble, ĉar la demando tutdetale traktita okupus tro longan spacon mi kontentiĝas nur klarigi ĝeneralaĵojn, tute lasante flanken la esceptojn, tiel malfacilajn kaj oftajn en la gramatikaj demandoj.

Se ni rimarkas, ke la lingvo estas nur la esprimo de la pensoj, kiuj naskiĝas en la menso, oni tuj komprenos la celon de la substantivo kaj verbo, kiuj respondas al la logikaj terminoj: subjekto kaj predikato de ĉiu simpla prijuĝo aŭ propozicio.

Ĉiu simpla penso konsistas el tio, ke la menso vidas rilaton inter du terminoj: unu pri kiu oni asertas, kion oni vidas, kaj ĝi estas la «subjekto», kaj alia esprimanta kion oni vidas kaj asertas, ĝi estas la «predikato». Presentante plej simplan ekzemplon por bone distingi la du ĉefajn terminojn, mi diras, ke en la propozicio «infano kuras», «infano» estas la subjekto pri kiu oni asertas, ke ĝi «kuras (predikato)». Al la logika termino «subjekto» respondas gramatike la «substantivo (infano)»; al la «predikato» respondas la verbo «kuri» kun siaj multaj finaĵoj, as,-is,-os,-us,-u, per kiuj verbo distingas sin de ĉiuj alispecaj vortoj.

La propozicio postulas, ĉu esprimite aŭ ne, la verbon, kun ĝia persona finiĝo: as-is, k. c.

Difininte precize kaj simple la du ĉefajn vortojn: subjekto kaj verbo ni alpaŝu al la du ceteraj, kiuj konsistigas la nomitan «gramatikan familion». «Adjektivo» estas vorto, kiu difinas, determinas

aŭ kvalifikas substantivon, aŭ plej simple kaj trafe: adjektivo estas ĉio, kio rilatas al substantivo: abjektivo povas esti unu aŭ plurvorta: ekz.: «la bona infano kuras», «bona» estas unuvorta adjektivo: «kafo kun lakto», «kun-lakto», duvorta adjektivo de kafo; «la plej ofte laŭdita lernolibro», «plej-ofte-laŭdita» trivorta adjektivo de lernolibro.

Adverbo estas unu aŭ plurvorta esprimo, kiu rilatas al verbo, adjektivo aŭ alia adverbo: ekz.: «li tre amas», «tre» adverbo, kiu rilatas al verbo «amas». «Li estas tre saĝa», «tre» adverbo, kiu rilatas al adjektivo «saĝa»; fine, «li tre bone pentras», «tre» simpla adverbo, rilatanta al verbo «bone» kaj «tre-bone» duvorta adverbo rilatanta al verbo «pentras». En la propozicio: «li kantas en ĉiuj tagoj», «en-ĉiuj-tagoj» estas trivorta adverbo rilatanta al «kantas», ĝi egalvaloras al unuvorta adverbo «ĉiutage» en la propozicio: «li ĉiutage kantas».

La prepozicioj estas vortetoj, kiuj antaŭiras aliajn vortojn kaj ne havas plenan signifon per si mem, sed nur estas eroj aŭ elementoj de plenaj formoj, kaj ili anstataŭas la antikvajn sufiksojn. La prepozicioj esprimas rilatojn pri loko kaj transire pri tempo, kaŭzo, k. c. Ekz.: «en la domo», «en» prepozicio montranta internan lokon: «post mia promeno», «post» prepozicio, kiu montras sekvantan tempon, kaj en «pro mia insulto», «pro» estas kaŭza prepozicio. «Per» montras ilon, «sen» mankon k. t. p.

La konjunkcioj estas ligvortoj, kiuj kunigas la propoziciojn. Ekz.: «Li ne kantas, sed skribas». «Sed» estas konjunkcio, kiu kunigas la du propoziciojn: «li ne kantas», «li skribas». Atentu ke estas du propozicioj, ĉar estas du verboj kun persona finiĝo: «kantas», «skribas». La konjunkcio povas esti plurvorta. Ekz.: «Li ne venis pro-tio,-ke mi ne petis lin pri tio». «Pro-tio-ke», estas trivorta konjunkcio kunliganta la du propoziciojn (kun persona verbo: «venis», «petis»). Li ne venis. Mi ne petis lin pri tio.

Post tiuj difinoj mi montros nur praktike la trafan manieron distingi en Esperanto adverbojn, prepoziciojn kaj konjunkciojn kaj tio estos la celo de la dua parto de tiu ĉi artikolo.

(Daŭrigota).

LA SPRITA VESPERMANĜO

EL BALTASAR DEALCAZAR

Traduko tre kore dediĉita al mia kara amiko kaj profesoro de Esperanto S-ro Vicente Inglada.

En Gjen' loĝas, kiel mi,
Don Lope de Sosa, jes;
Kaj mi strangajon, Agnes',
El li rakontos al vi.

Servis kavaliron tian
la portugali... sed ni
Vespermanĝu nun, se vi
Ne volas ion alian.

La tablo jam pretigita
Estas kaj la manĝotaĵoj,
La vintaso, la pluajoj...
Nur la festen' prokrastita.

Per freŝa vin' komencaĵon
Ni faru kaj benu ĝin;
Mi ja kutimigis min
Sanktigi mian trinkaĵon.

Neŝpara, de l' dubkolora
Vin' estis l' unua gluto...
Revenu l' vin', kies guto
Estas florenon valor!

Ĉe Kastiljo, vetas mi,
Vi ĝin aĉetis malŝpara.
Estas tia vino kara;
Malkaran ne havas li.

Ankaŭ Alkocer', laŭ mino,
Riĉan vinvendejon havas...
Grandan konsolon enhavas
La najbareco de l' vino!

Ĉu malnovajo ĝi estas
Aŭ ne, ja nescias mi;
Sed la drinkejo, pro Di',
Bel-eltrovaĵon atestas.

Soifante mi eniras
Kaj petas pri freŝa vin!;
Mi ricevas, trinkas ĝin
Pagas kaj gaje foriras.

Per si laŭdiĝas ĉi tio;
Ni ĝin plilaŭdi ne povas;
Nur kontraŭaĵon mi trovas:
Baldaŭ finiĝos porcio.

Sed, post pipra viandaj'
Kun salat', petas pri paso
Sinjorin' Sangokolbaso,
Respektinda frandaj'.

Ho, kia pompa beleco!
Ĝi ŝajnas, al ni venanta
Kvazaŭ nin, Agnes' tentanta
Per tia gras' kaj dikeco.

Nu, ĝi, do, sin maletendu
Tra la mallarĝa vojet!...
Ne l' akvovina kunmet'
Igu, ke la ventro plendu!

Plej bonan gustekscitilon,
Vinon enverŝu multjaran...
Di' gardu vin, al mi karan,
Akceptintan bonkonsilon!

Vi ŝategas Ĝian sangan
Kolbasan Moŝton, ĉu ne?
Ĝia tropiceco, ve,
Jukegadon kaŭzas langan!

Frandaj' estas ĝi kortega,
Kun pinsemoj tramiksita;
Kaj de via man' rostita
Pri porkid-grasig' lertega.

Mia kor' pro ĝoja sento
Krevas. Ĉu same por vi?
Mi ne scias, sed, laŭ mi,
Ankaŭ vin kaptis kontento.

Min forravas plena ĝu'...
Sed, diru, pro Dia l' am':
Estis unu lampoflam'
Kial mi jen vidas du?

Sed nur stulta kaj malmobla
Estas ja demando tia:
Pro trinkad' tiel malpia
Iĝis la lampet' duobla.

Nun la vinkruĉan nektaron
Ĉielan gustumu ni;
La freŝa vin', antaŭ ĝi,
Eĉ ne meritas komparon.

Kia bela klaregeco!
Kia gustec' kaj odor'!
Kia purec' kaj kolor'!
Kaj ĉio laŭ plenboneco!

Jam l'oliv' petas pri paso,
La fromaĝo lokon prenas:
Ambaŭ demandante venas
Pri la kruĉo kaj la taso.

Fromaĝon gustumu tian,
Ke ĝi la Pint'an superas;
Kaj l'oliv' ankaŭ aperas
Plenumante rolon sian.

Min, do, laŭ kutim' ŝoviĝu
La felvinuj' plenigita...
Ses glutojn! Manĝo farita!
La tablotukoj leviĝu!

Kaj post kiam ni manĝadon
Faris jam sate kaj rave,
Nun ŝajnas esti plej prave
Daŭrigi la rakontadon.

Nu, la portugali', fratino,
Ekmalsanis, mi dormiĝas...
La dekunua batiĝas...
Restu por morgaŭ la fino.

El la hispana lingvo libere tradukis,

MANUEL VÁZQUEZ.

En mia kurso de Esperanto, farita ĉe la Centro por prihistoriaj studaĵoj, de post la 15^a de marto

ĝis la fino de junio, la lernantoj faris lastatage tradukojn esperantajn el literaturaj hispanaj tekstoj de Alarcón, Campoamor, Becquer k. c.). S-ro Vázquez elektis mem kaj tradukis la mirinde belan versaĵon «Vespermanĝo». La traduko estis prijuĝata ĉe interdiskuto de la lernantoj kaj profesoro, al kiu alestis S-ro Maynar, kiu honoris mian kurson per sia partopreno en unu el la lecionoj, kiu okazis ĉe la fino de Majo. Tiu ĉi traduko, kies meritojn taksos ĉiuj hispanaj Esperantistoj, montros unue la mirindan simplecon de Esperanto kaj due la grandan lertecon de S-ro Vázquez, kiu post 2-monata lernado faris la belan tradukon de literatura juvelo, kies dediĉon mi plej kore dankas, sentanta min tre fiera havi tian altmeritan lernanton kaj lertegan Esperantiston.

Rim. de V. INGLADA.

Urga bazono por la hispanamerikaj geesperantistoj

Preskaŭ en ĉiuj naciaj esp.Kongresoj oni rimarkigis la grandan neceson pri novaj vortaroj hisp-esperanta kaj esper-hispana; sed la plendaj voĉoj nur estis tio: voĉoj kaj plendoj, ne agoj.

Vere la vortaroj kiujn ni havas antaŭ 20 jaroj estas ne sufiĉaj. La firmo Espasa eldonis ilin, kaj sendube reldonis multfoje ilin sed same kiel la unuan fojon. Tio estas pro du kaŭzoj: la eldonisto penas atingi grandan profiton kaj tute ne scias la progresojn de nia dua lingvo. La nunaj vortaroj estas utilaj nur por la komencantoj. La praktikuloj bezonas, bezonegas, kompletan vortaron, kaj ni ĉiuj devas alporti tiucele nian penon grandan aŭ malgrandan.

La laboro estas grandega, jam ni scias ĝin, sed ni parolas ĉar ni scias, ke jam estas preparita. S-ro Inglada, nia tre klera samideano, havas la manuskripton de kompleta vortaro tute preta. Lia nomo estas ja plena garantio pri tio ke la verko estos inda. Sed... tie estas la «sedo» kiu baras tiom da grandaj kaj meritindaj faroj. La ĉiama «sedo»... la mono.

La eldono de vortaro kiu almenaŭ ampleksos trifoje la nunan vortaron kostas 4.000 aŭ 5.000 pesetojn la esper-hispana kaj duoble la hispan-esperanta, entute pli da pesetoj ol povas havi esperantisto—Ĉiuj malriĉaj--por dediĉi unufoje al Esperanto.

Sed ĉar ni bezonegas tiun verkon ni devas pripensi la rimedojn. Ni proponas al ĉiuj hispanamerikaj geesperantistoj la eldonon laŭ sinsekvaj kajeroj. Tiel eĉ la plej malriĉaj povos helpi tion, kio estas necesega por nia idealo kaj urĝa ĉar povus okazi, ke iu ajn sen sufiĉaj meritoj farus la entreprenon.

Do, amerik-hispanaj samideanoj; ĉiuspecaj esperantaj grupoj! Ni vokas vin! Diru vian opinion pri tiu propono tiel grava por Esperantujo. Se ni ricevos sufiĉajn oferabonojn ni daŭrigos nian laboron ĝis kiam nia intenco estu realaĵo.

FRATECO.

EKSTERLANDAJ PAĜOJ

KIAL ASTRONOMIO NE NASKIĜIS EN JAPANLANDO?

Por taksu bone la propran kulturon kaj civilizacion de Japanlando, estas necese koni la problemon, kial en ĝi ne naskiĝis astronomio, kiu donas al la progreso de sciencoj multan, multegan utilon. Sen astronomio la homaro fakte neniel povus atingi la nuntempan altgradan civilizacion. Pri tio oni povas trovi bonan artikolon en la libro «La valoro de l'scienco» t. e. «La valeur de la science», verkita de D-ro Henri Poincaré, franca mondfama sciencisto. Tial mi tie ĉi ne priskribas pri ĝia utilo, tamen estas dezirinde, ke vi legu antaŭe la diritan artikolon. Ĉar kiam ni lernas japanan propran civilizacion, tiam ni devas ĝin taksu esceptinte ĉiam influon de la astronomio.

Nu, mi komencu klarigi la problemon, kiun mi jam al vi promesis. Ĉar astronomio ne povis naskiĝi en Japanlando, tial estas supozeble, ke oni povus trovi malmulte da versoj, kiuj esprimas la belecon de la steloj ankaŭ en la historio de japana klasika literaturo. Jes, tiu ĉi estas vera. Kvankam oni povas trovi iomete da ili, ilia ĉefa temo, kompreneble ne ekzistas ekskluzive en la beleco de la steloj, sed kontraŭe en la beleco mem. Kaj plie estas tre malmulte da steloj, kiuj havas la pure japanisman nomon. (Kompreneble, Venuso estis tre bone konita en la nomo «La brila stello en tagiĝo aŭ vesperiĝo», kaj la α -stelo el «Lyra» kaj la α -stelo el la «Aquila» havas kune interesan kaj erotikan legendon, laŭ kiu japanoj kutimas ilin festi en la 7^a de la 7^a monato laŭ la lunkalendaro. Tamen tiuj ĉi legendo kaj kutimo venis el Ĉinlando). Tiu ĉi fakto pruvas, ke niaj prapatroj ne estis intimaj kun la steloj ne sole en la literaturo, sed ankaŭ en la vivo (ĉar ĉio, kio estas grava por la vivo, ne povas esti ignorita nur en la literaturo).

Kial do ili estis tiel apatiaj por la steloj, kiuj troviĝas en tuta la ĉielo, malgraŭ ke ili neniam estis indiferentaj al la aliaj kreitaĵoj en la naturo? Oni klarigas tiun ĉi demandon per tio, ke pro malsekeseco de la aero la steloj ne povas esti tiel belaj en Japanlando, kiel en Eŭropo aŭ aliaj provincoj, sekve la steloj ne povis sufiĉe ĉarmi niajn prapatrojn. Estas vero, ke la aero estas tre malseka en nia lando, tamen la steloj estas

videblaj tre bele, precize en la aŭtuna sezono. Tial tiu ĉi klarigo, mi opinias estas tute supraĵa.

Kial do niaj prapatroj ne turnis atenton al la belegaj steloj?

Mi opinias, ke tio kaŭzas ĉefe de la landformo; alivorte la landformo de Japanujo estas tre montoza kaj malvasta, tial niaj prapatroj ne povis esti nomado, kiu de loko al loko vagadas sur vastega kamparo sekve ili ne bezonis sciigi la direktojn suprenrigardante la stelojn; kaj ili ne havis kutimon vojaĝadi sur la oceano, tial ili konsekvence ne havis okazon turni atenton al la steloj ne sole sur la lando, sed ankaŭ sur la maro. Ĉar iliaj loĝejoj lokiĝis tre proksime de la monto, tial estas supozeble, ke ili kutimadis dormiĝi fruvespere timante la atakojn de multaj bestoj, kiuj prospere kreskis dank' al la montaro.

Tiele ili neniam havis la okazon bezoni kaj utiligi la stelojn. Tial estas evidente, ke niaj prapatroj estis tute indiferentaj al la steloj, kaj sekve ne povis kanti la belecon de ili, nek studi ilin science, kaj mi ankaŭ ĉi tie povas forte konscii, ke la neceseco en la vivo aŭ ĝia produkto estas la plej granda kaj ĉefa motivo por naski ĉiujn sciencojn. Mi ne bezonus prezenti por tio la argumentojn. Ĉio efektive necesa estas naskita, eltrovita kaj elpensita de la homaro. Tio ĉi estas la sama ankaŭ kun la lingvo Esperanto. Tial estas konsekvence, ke ni esperantistoj fine venkos la tutan mondon, malgraŭ ke nia movado nuntempe ne povas iradi en la sufiĉe bona stato kaj grado. Ni do iru la vojon jam celitan, nur rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante, laŭ la instruo de nia Majstro, D-ro L. L. Zamenhof.

Miĉuuo Noguĉi.

Japanio.

INTERNACIA ESPERANTA-MUZEO

Wien, I. Neue Burg (imperiestra kastelo) Heldenplatz

«La Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW) fondita 1929 en Wien, konservas ĉiun materialon, kiu koncernas la «mondhelplingvan demandon.

Ŝtata entrepreno, sed sub gvidado de la Esperantistoj kaj je dispono de ili. Granda propagando por nia celo!

Jam vizitata de multaj eminentuloj kaj samideanoj el tutmondo!

Protektoro la ŝtatprezidanto de Austrio.

Pli ol 6000 libroj (inter ili la kolekto «Cart» kun 1500 libroj), pli ol 1000 gazetjarkolektoj, 150 aperadantaj gazetoj.

La ŝtato disponigis belegan hejmon, bindigas la librojn ktp.

Helpu al la «Mekko» de la Esperantistoj:

1. Per aliĝo. «Ĉiu grupo» estu «membro por 10 jaroj».

«El ĉiu loko» almenaŭ krom la grupo unu samideano estu «dumviva membro».

La kotizo por ambaŭ estas po svis. Fr. 12,50 aŭ egalvaloro (ankaŭ pagota en 3 partoj).

Ĉiu membro ricevos: Membrokarton; numeron de Austria Esperantisto, en kiu estos publikata la aliĝo; 3 diversajn fotojn pri IEMW; 4 diversajn gvidfoliojn kaj ĉiam la novaperitajn de Austrio; 64 paĝan ilustritan gvidlibron de Wien; dum vintro 1932-32 «Adresaron pri Honora, Kuratora Komitatoj, ĉiuj membroj, grupoj ktp. kiuj aliĝis, kaj ĉiujare «Aldonojn al Adresaro» (novaliĝintoj, adressanĝoj); por novearbita membro Esp. libron.

2. Per sendado de materialo: libroj—broŝuroj—statutoj—manuskriptoj—presajoj ĉiuspecaj—la tutan materialon de intern. kaj landaj kongresoj—leteroj kaj fotoj de eminentuloj—fotoj de grupoj, ekspozicioj ktp. IEMW kolektas la presajojn en «Esperanto aŭ iu ajn sistemo» (Volapük, Ido, Novlatin Occidental, Basik ktp.) «aŭ en la naciaj lingvoj» pri iu sistemo de la mondhelplingvo.

Nia lando klopu, ke ĉiu grupo kaj multaj lokoj estu en la adresaro!

Havigu per tio al nia lando bonan propagandilon!

FUNE BRAJ LITEROJ

Ni ĵus ricevis la sciigon pri la morto de nia maljuna kunsocietano kaj fervora esperantisto de Madrido, S-ro Eduardo Cano y López-Ayllón; tio okazis la 16^{an} de la nuna monato. Al lia familio ni sendas la plej koran kondolencon por tia granda malfeliĉo.

SCIIGOJ

La 1^a kaj 2^a de la nuna monato okazis en Zaragoza la kunvenoj de «Aragona Esperantista Federacio» kaj «Hispana Esp. Konfederacio» kun ĉeesto de delegitoj de la regionaj grupoj kaj de la Federacioj.

Paco kaj Amo solene festis la 15^{an} de tiu ĉi monato la feliĉan Arĝentjubleon de la fondo de tiu ĉi societo.

Ni tutkore gratulas ĝin kaj deziras longan vivadon kaj plensukceson en ĝia laborado por disvastigo de Esperanto.

Loterio.—Kiel en la antaŭaj jaroj ni aĉetos 2.000 ptjn de la kristnaska loterio, kiun ni oferas al niaj amikoj. La partoj estas po unu peseto.